

# O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.  
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO".

Número 61-63 (343-345)

Janeiro-Março 1943

Redator responsavel:  
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:  
Praça da República, 54.  
Rio-de-Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.  
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15  
respondkuponoj.

## Novjara saluto 1943

Ni ricevis la malsupran novjaran saluton,  
kiun ni tre kore dankas:

Miaj deziresprimoj por la NOVA JARO.  
Tre estimata Samideanaro:  
Jen en l' abismon de la temp' falinte,  
jam malaperis ree unu jaro,  
kaj sin prezentas nova, alveninte.  
Al la homaro kion ĝi alportas?  
Ĉu l' justan, ĉie deziratan pacon?  
Ĉu l' civilizacio, kiu mortas,  
ricevos nun la reviviĝ-donacon?  
Neniu homo tion povas diri,  
ĉar ne ekzistas nun profeto vera:  
ni povas tamen pensi kaj deziri:  
La Nova Jaro estu pli prospera!  
Deziras mi ke bonaj tagoj venu,  
kaj al vi ĉiuj konservante sanon,  
vin Dio feliĉigu, kaj Li benu  
la noblan menson kaj l' agantan manon.

Via sincera samideano kaj amiko,

F. V. Lorenz

S. Feliciano, Rio G. do Sul, la 1-an de  
Januaro de 1943.\*

## LA KARNAUBO

(Copernicia cerifera)

### LA PLEJ MIRINDA ARBO EN LA MONDO

*Se estas permesata nomi arbo la belan palmon, el kies foliaro oni ekstraktas la karnaubvakson.*

Ĝi havigas al la homo nutradon, ŝirmadon, vestaron, medikamenton kaj diversajn aliajn utilaĵojn.

Ĝi rezistas al la plej teruraj kaj daŭraj senpluvecoj en sia *habitat*, kiu estas la nordoriento de la Lando, kaj restas verda etendante sian freŝan ombbron sur la elsekigitan grundon, dum la tuta vegetaĵaro estas cindrigita de la sunradioj.

Ĝiaj radikoj havas terapiajn virtojn de la smilako, kaj ĝia trunko produk-

tas rezistan lignon, kiu estas uzata ĉe la konstruado de domoj kaj ĉe la fabriko de mebloj, muntkadroj ke., se ĝi estas rabotita kaj ĉarpentita por tio.

El la karnaubo oni ekstraktas vinon kaj vinagron kaj ankaŭ nutran amelon similan al la saguo.

La frukto de la karnaubo estas uzata kiel nutraĵo por la brutaro kaj ĝia kerno kaj migdalo, kiu estas oleeca, povas esti uzataj kiel surogatoj de la kafo.

La ŝelo de ĝia trunko, povas servi kiel akvodefliilo kaj anstataŭigi la korkon. El ĝia trunko, povas servi kiel akvodefliilo kaj anstataŭigi la korkon. El ĝia trunko oni ekstraktas laktecan substancon, similan al la koka laktio, kaj farunon, kiu similas la maizan kaĉfarunon (*fubá*).

Ĝiaj folioj, post la ekstrakto de la karnaubvakso servas por kovri domojn kaj la fabrikado de ĉapeloj, korboj, matoj, balailoj ke. Al Eŭropo ili estas eksportataj grandkvante kaj el tie ili revenas aliformigitaj en ĉapelojn.

Krom la vakso, oni ekstraktas el la karnauba foliaro alkalecan principon, kiu estas uzata ĉe la fabriko de sapo.

Mirinda arbo, la karnaubo, kiu estas utila al la homo ĉiumaniere!

(El la "O Farmacêutico Brasileiro", kies ĉefredaktoro estas s-ro A. Caetano Coutinho.).



Karnaubaro en Parnaíba. La karnaubo estas la plej malavara el la nordorientaj palmoj. Ĝi liveras al la homo: nutradon, loĝadon, vakson kaj lumon. El ĝi ĉio estas utiligata de la radikoj ĝis la folioj. Stato Piauí.

(Kliŝo de la "Brazila Konsilantaro de Geografio")



## Dua Argentina Esperantista Kongreso

Dum la venonta Pasko, de la 22a ĝis la 25a de Aprilo nunjara, okazos en Buenos Aires la DUA ARGENTINA ESPERANTISTA KONGRESO. Jen estas ĝia provizora programo:

Ĵaŭde vespere — solena malfermo kaj propaganda vespero,

Vendrede matene — unua labor-kunsido,

Vendrede posttagmeze — vizito al muzeoj, ktp.

Sabate matene — dua labor-kunsido,

" tagmeze — bankedo,

" posttagmeze — vizito al la urbo.

Dimanĉe — ekskurso aŭ alia aranĝo, laŭvole.

Por aliĝi al la Kongreso sufiĉas pagi la sumon de tri pesoĵ. La kongresmembro rajtas ricevi Membrokarton kaj insignojn, kongresbultenojn, kongreslibron kaj ĉiujn aliajn kongresdokumentojn, kaj partopreni la kunvenojn kaj aliajn kongresaranĝojn.

Adreso: "Segundo Congreso Argentino de Esperanto — Sarmiento 1614, Buenos Aires, Argentina.

Aliĝis al tiu Kongreso "Brazilia Ligo Esperantista", "Associação Esperantista do Meyer" kaj S-roj Ismael Gomes Braga, A. Couto Fernandes, Mário Ritter Nunes kaj Delio Pereira de Souza.

## U S O N O

"Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas!

Lando, pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas! Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas antaŭ vi, kaj mi estas felica, ke la sorto permesis al mi, vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj; sed ne vidama turismo enŝipigis nin, ne la espero de ia komerca akiro pelis nin al via bordo; ni venis al vi, por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri ia nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Peco de tiu miksidevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo

## BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

La 30an de Januaro 1943a, ĉe la sidejo de la "Societo de Geografio de Rio de Janeiro", okazis ordinara kunido de BRAZILA LIGO ESPERANTISTA, prezidita de s-ro inĝ. Alberto Couto Fernandes, dumviva prezidanto, kaj sekretariita de Profesoro João B. de Mello e Souza, ĝenerala sekretario, kaj fino Iraní Baggi de Araujo, dua sekretariino, kun la ĉeesto de la reprezentantoj de la jenaj filiitaj grupoj esperantistaj: Brazilia Klubo Esperanto, Esperanta Grupo de Baía, Pernambuco Esperanto-Asocio, Esperanta Asocio de Rio Grande do Norte, Grupo Esperantista "Humberto de Campos", Esperanto-Rondeto de S. Sebastião, Grupo Esperantista "F. V. Lorenz" kaj "Associação Esperantista do Meyer" kaj de diversaj ligoj.

La dua sekretariino legis la protokolon de la antaŭa kunsido kiu estas aprobita, la raporton de la prezidanto kaj la bilancon de la kasisto.

La prezidanto sciigis la ĉeestantaron, ke vakas la oficon de unua sekretario, ĉar s-ro João Telles da Silva, kiu ĝin okupis, eksigis pro sia forigo el Rio de Janeiro. Tiam oni elektis d-ron Mário Ritter Nunes por okupi tiun postenon.

Poste li informis, ke la Direktoro de la Departamento de Poŝto kaj Telegrafo, majoro Landry Salles, plenumis la petojn de la prezidantoj de B. L. E. kaj de la "Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko" pri la enmeto de Esperanto en la liston de la nun cenzurataj lingvoj.

Li ankaŭ informis la ĉeestantojn pri la fondo de "Grupo Esperantista de Florianópolis", kies du estraranoj lernis Esperanton ĉe la kurso okazinta, dum la 1941a jaro, ĉe la "Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko".

nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu nin, aŭskultu nin, kaj konvinkigu, ke ni ne estas fabelo.

Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana, sed ĝi baldaŭ eĉe resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra la tuta via kontinento".

(Vortoj de D-ro L. L. Zamenhof okaze de la inaŭguro de la Sesa Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Washington en la jaro 1910a).

ko", kaj laŭdis la decidon de la "Associação Esperantista do Meyer" aliĝi al niaj Ligoj ĉiujn siajn membrojn, tiel sekvinte la belan ekzemplon de la veterana "Brazilia Klubo Esperanto".

La prezidanto resumis la cirkuleron de la *Argentina Esperanto-Ligo* pri la Dua Argentina Kongreso de Esperanto, okazonta en Buenos Aires dum la nunjara Aprilo, kaj invitis la ligojn aliĝi al ĝi.

S-ro Mello e Souza, petinte la parolon, deklaris, ke li deziras fari al la ĉeestantaro du komunikajojn, nome: pri jusa publikigaĵo aperinta en S. Paulo kaj pri sia vizito al la "Argentina Esperanto-Ligo". Pri la unua li aldonis, ke li bedaŭras esti devigata alporti al B. L. E. tre malagraban sciigon kaj prezenti protestan proponon. Temas pri libro destinita al la brazilaj infanoj, titolita "O Espanto das Gentes" kaj eldonita de la "Companhia Editora Nacional", el São Paulo. En tiu ĉi libro, verkita de Monteiro Lobato, aperas groteska kaj ridinda persono, kun stranga bildo, kiun, kvankam prezentitan kiel saĝulon, la aŭtoro malaltigas ĝis la kategorio de "Azenvizaĝulo". Al tiu persono donis la aŭtoro la nomon D-ro Zamenhoff. Kvankam skribita per ff, tiu nomo memorigas, por ĉiu kulta persono, tiun de la aŭtoro de Esperanto, homo, kiu sendube figuras inter la grandaj bonfarintoj de la Homaro. Certe, diris la parolanto, la brazilaj esperantistoj tute ne povos ne protesti kontraŭ tiu malrespekto, kiun neniel oni povas pravigi.

Poste li parolas pri sia vizito al la Argentina Esperanto-Ligo. Bedaŭrinde nur ĉe la lasta tago de sia rapida ĉeesto en Buenos Aires, li povis viziti la argentinajn samideanojn. Ricevite de S-ro Sekelj, kiu lin prezentis al la ĉeestantaro, li plenumis la komision, kiun li ricevis de B. L. E., kaj transdonis al S-ro Sekelj la publikigaĵojn, kiujn li kunportis. Malgraŭ la urĝaj sindevigoj, kiujn li havis, la parolanto, obeinte al insistaj kaj afablaj petoj, daŭrigis sian viziton per interparoladoj, dum kiu li sciigis la ĉeestantaron pri la laboroj por Esperanto en Brazilo. S-ro Sekelj, en la nomo de la ĉeestantoj, deziris al la brazilaj vizitantoj feliĉan revenon al sia lando kaj petis ke li reciproku la salutojn senditajn de Brazilia Ligo Esperantista.

Post la aprobo de la protesto sendota al la "Companhia Editora Nacional" la prezidanto fermis la kunsidon.



## NIA PREZIDANTO

De nia Prezidanto, Generalo Louis Bastien, ni ricevis leteron, la unuan post la cedo de Francujo. Li raportas, ke li estas pli sana nun, post severa malsano en 1939, kaj la perdo de sia edzino. Sendube ĉiu membro deziras al li plenan resaniĝon kaj la liberigon de lia lando, tiel ke ni ree havu la eblecon renkonti lin, kaj li la okazon denove labori por la Movado kaj la Ligo.

En lia letero li skribas, ke en Marseille okazas publika kurso en Esperanto, gvidata de S-ro Bourdelon, kaj ke oni permesas al Esperantistoj porti la verdan stelon. La grupo en Lyon regule eldonas bultenon, sed oni dubas ĉu estos eble daŭrigi tion pro la manko de papero. La Prezidanto mencias la morton de kelkaj malnovaj amikoj (S-roj Pouchot, Beck, Deshayes...), kaj ke kelkaj estas militkaptitaj de la germanoj (inter ili, S-ro Waringhien kaj Jossinet). En kelkaj aliaj partoj de neokupita Francujo Esperantistoj vikle laboras, sed en la okupita parto nenio estas ebla.

Por ni estis granda ĝojo ricevi tiun leteron kaj scii, ne nur ke S-ro Bastien plisaniĝas, sed ankaŭ ke li restas plena de espero por la estonto de nia movado. Efektive, li skribis: "Ĉio tio (pri la agado en neokupita Francujo) estas kuraĝigo por la post-milita periodo, kiam ni povos serioze rekomenĉi nian laboron".

Ŝajne nia Prezidanto scias nenion pri nia nuntempa laboro, kvankam li informiĝis ke oficejo daŭre funkcias. Li tute ne scias, ke ni regule eldonas la jarlibron kaj gazeton, kaj krome ke ni sukcesis forpagi multajn ŝuldojn, kaj multe malgrandigi la sumon de la deficitaj jaroj. Sen ia dubo, tre plaĉos al li trarigardi post la milito niajn eldonaĵojn dum la nuna terura periodo. Tute certe, li estos tre danka al tiuj, kiuj subtenis la Ligon en tempo kiam ŝajne ĝi tute ne povus ekzisti.

Kaj mi tre esperas, ke kiam alvenos la tempo por la unua post-milita kunveno de nia Estraro, ni povos montri al ĝi, ke pro la malavara helpo de niaj samideanoj, eĉ en la malfacila milita periodo, la deficitita konto en niaj kontlibroj estos malaperinta. Jen oportuna momento por sciigi al vi, ke la forpasinta F-ino Horncastle (Croydon, Anglujo) testamentis al ni £50; tiamaniere la deficitita koboldo malpliĝis ĝis £1174 (en 1939 ĝi estis £1500).

C. C. G.

(El "Esperanto Internacia" — Nov.-Dec. 1942)

# Brazila Ligo Esperantista

(LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA)

## BALANÇETE

Saldo de 1941 . . . . .	Cr\$ 60,63	
Quotas de sócios . . . . .	Cr\$ 2.991,00	
Venda de livros e cartões-postais . . . . .	Cr\$ 1.179,20	
Traduções feitas pelo Presidente da Liga . . . . .	Cr\$ 240,00	
Venda de exemplares do Boletim . . . . .	Cr\$ 138,00	
Curso por correspondência . . . . .	Cr\$ 20,00	
Impressão de "O Brasil Esperantista" e outras . . . . .	Cr\$ 962,80	
Pagamento à "Internacia Esperanto-Ligo", em Londres, por quotas de sócios . . . . .	Cr\$ 1.877,70	
Aquisição de livros e fotografias . . . . .	Cr\$ 96,80	
Assinatura de revista . . . . .	Cr\$ 14,00	
Material de expediente . . . . .	Cr\$ 32,30	
Despesas de conservação e asseio . . . . .	Cr\$ 361,00	
Vencimentos do pessoal . . . . .	Cr\$ 325,00	
Encadernação de livros . . . . .	Cr\$ 48,00	
Selos, estampilhas, telegramas e despesas miudas . . . . .	Cr\$ 569,10	
Auxílio à família Zamenhof . . . . .	Cr\$ 200,00	
Aquisição de distintivos . . . . .	Cr\$ 61,90	
Saldo para 1943 . . . . .	Cr\$ 80,23	
	Cr\$ 4.628,83	Cr\$ 4.628,83

Rio-de-Janeiro, 10 de Janeiro de 1943.

Visto

A. Couto Fernandes  
Presidente

Odílio Pinto  
Tesoureiro

## REVISTA BRASILEIRA DE GEOGRAFIA

Ni ricevis la duan kaj trian numerojn de la kvara jaro de tiu grava trimonata revuo, oficiala organo de la *Nacia Konsilantaro de Geografio*, fako de la *Brazila Instituto de Geografio kaj Statistikio*, registara Departamento.

La dua numero enhavas 206 paĝojn sur luksa papero kun multaj ilustraĵoj kaj kvar ĉefartikolojn kun resumo en kvin naciaj lingvoj kaj en Esperanto. Jen la titoloj de tiuj artikoloj: "La esplorado kaj okupado de la Brazila Amazonio", de ing. Virgílio Correia Pires; "La grundo de Amazonio", de Prof. S. Fróis Abreu; "La amazonasa vegetaĵaro", de Prof. A. J. Sampaio, kaj "La rivero Amazonas kaj ĝia baseno", de Prof. Delgado de Carvalho.

La tria numero enhavas 243 paĝojn kun resumo ankaŭ en Esperanto. Jen iliaj titoloj: "La klimato de Amazonio", de Prof. J. C. Junqueira Schmidt; "Limoj de la Brazila Amazonio", de Subkolono J. de Lima Figueiredo, kaj "transportoj en la Amazonio", de ing. Moacir M. F. Silva.

Jarabono: Unu dolaro kaj duono.

## BRAZILAJ PROVERBOJ

Na página 6 de "O Brasil Esperantista", n. 58-60, em vez de: *Boi morto, vaca é*, Mortinta bovo estas bovino, leia-se: *Boi morto, vaca é*, Bovino en la buĉejo, bovo en la mangejo.

## REVUJO

(De P. Dalman)

Sur la valo neĝa vento  
Blovas ĉiam pli;  
Fajro sur kameno mia  
Krakas ĉirkaŭ mi.

Ĉe l' amen' el pipo ringe  
Fumon lasas mi ...  
Ĉiuj rememoroj miaj  
Flugas for kun ĝi.

Kie estas la esperoj,  
La junec' de or'?  
Kiel vento la blovanta,  
Ili flugis for!

Vent' sen celo, mi sen celo  
Kun vi, fumo, tri...  
Tri sen celo en la mondo  
Kune flugu ni!

A. Grabowski

(El la "Fundamenta Krestomatio")



## Não ha cultura completa sem o conhecimento do esperanto

Que é cultura no sentido intelectual da palavra? Todos já sabem; porém vamos recordar o conceito de cultura, para o desenvolvimento do nosso raciocínio. Cultura é um conjunto mais ou menos amplo de conhecimentos: nas artes, nas letras e nas ciências. Dizemos que um indivíduo é tanto mais culto, quanto maior e melhor for a soma de conhecimentos que ele possua. Assim uma pessoa terá mais cultura artística do que outra, se possui mais conhecimentos sobre as artes do que esta última; e, na própria arte, a cultura pode se especializar na pintura, na música ou na escultura; o mesmo raciocínio pode ser aplicado às letras e às ciências. E temos, portanto, a considerar uma cultura estética (artes e letras) e uma cultura científica (ciências). Ambas podem existir com fins exclusivamente de divertimento espiritual, por amor ao belo ou inclinação às ciências, ou por motivos profissionais, para o indivíduo manter a sua subsistência. Ou ainda pode acontecer que os dois fins se associem no mesmo indivíduo: é o caso dos que exercem a sua profissão, de acordo com sua vocação, atingindo simultaneamente o fim de satisfazer as suas tendências espirituais e de ganhar o seu pão; então teremos o pintor que vive dos seus quadros, o tenor que vive da sua voz, o cirurgião que vive do seu bisturi, ou o engenheiro que vive das suas construções, quando eles amam apaixonadamente as suas profissões.

Recordado o conceito de cultura, que entenderemos então por cultura completa? É óbvio: é uma cultura geral sobre os conhecimentos humanos. Rigorosamente, seria o conhecimento de todas as artes e de todas as ciências, profundamente. Mas, devido ao grande desenvolvimento dos conhecimentos humanos e à pequeníssima duração de nossa vida, torna-se hoje impossível a um cérebro humano ter um conhecimento profundo de todas as artes e ciências. Não porque isto seja impossível ao homem, por deficiência de inteligência, mas sim porque é impossível pela insuficiência do tempo para estudar. Portanto praticamente poderemos entender por cultura completa um conhecimento geral sobre as artes e as ciências.

Porém, quantos indivíduos têm estes conhecimentos? Pouquíssimos, relativamente à população que habita atualmente o nosso planeta. A causa de serem pouquíssimos estes indivíduos, não nos interessa aqui. Assinalemos apenas o fato de eles serem raros.

Mas a maioria da humanidade é composta de medíocres. E estes medíocres quando têm um simples vestígio de cultura, por menor que seja, fazem disso um motivo de vaidade e de propaganda de si mesmos. Mas cultura não é sinônimo de inteligência: daí os cultos medíocres e os inteligentes incultos. Num sociedade ideal todos os indivíduos seriam cultos, embora nem todos fossem de inteligência superior: desapareceriam as elites culturais, que se chamam impropriamente de "elites intelectuais", mas continuariam as elites da inteligência, que seriam as verdadeiras elites intelectuais. A falta de cultura é um mal social que poderá ser sanado; mas a ausência da inteligência é um mal biológi-

co: daí as anormalidades mentais. Mas, com o desenvolvimento dos estudos biológicos de hereditariedade e com a aplicação da eugenia poder-se-á melhorar o nível intelectual da humanidade, cada vez mais; mas isto não significa que se fabricará no futuro gênios em série. Sem dúvida haverá mais gênios do que hoje, mas eles serão a minoria comparados à população total do mundo.

Mas que tem a cultura com o conhecimento do Esperanto? Para os medíocres de todo o mundo — nada; mas para os homens que pensam numa humanidade melhor — tudo. Expliquemo-nos; aqueles pensam que são cultos, mas só conhecem o Esperanto de nome, ouviram falar numa língua artificial destinada a facilitar a comunicação entre os povos; mas como são dogmáticos começam a opinar insensatamente sobre o assunto, sem tê-lo examinado. Dizem dogmáticamente: o Esperanto é um sonho. Mas os esperantistas respondem: sim, é um "sonho": funciona há mais de cinquenta anos. E os medíocres continuam: não existem livros em Esperanto; então os esperantistas dizem: sim, "não existem livros", exceto os mais de 10.000 que já foram publicados, cujas edições vão a vários milhões de exemplares. E os enfatuados continuam afirmando aprioristicamente que o Esperanto não pôde ser o idioma humano, quando a prática vai mostrando que já existem atualmente alguns milhões de indivíduos no mundo que o conhecem, centenas de sociedades esperantistas, centenas de associações religiosas, ateístas, artísticas, literárias, científicas, profissionais, recreativas, educativas, etc., que o usam por meio de jornais, revistas, conferências, congressos, excursões, rádio, cinema, etc. Enfim, como última objeção, dizem que o Esperanto tem um espírito desnacionalizante, acaba com as fronteiras entre os povos, com o patriotismo. Mas não é o Esperanto que está gerando um novo espírito internacionalista e anti-chauvinista na humanidade; este novo espírito é apenas um resultado de múltiplos fatores sociais da vida moderna, e o próprio Esperanto é um êxito deste espírito internacionalista e não a sua causa. Com o Esperanto ou sem o Esperanto, o mundo marcha para a constituição de uma única família sobre a terra. O Esperanto, juntamente com a televisão, o rádio, o cinema, os meios rápidos de comunicações terrestres, marítimos e aéreos, é apenas o produto da nossa evolução social. Os que o combatem em nome do patriotismo, também deveriam combater a televisão, o rádio, o cinema, o automóvel, o navio e o avião, se fossem lógicos e coerentes. Deveriam falar o latim, e viajar em carro de boi, na época do Esperanto e do avião.

A cultura do nosso século também é internacional. Uma obra notável de arte, de literatura ou de ciência não é mais considerada propriedade de um só povo, mas de toda a humanidade. Já existem jornais, cujas edições vão a milhões de exemplares e que são espalhados em todo o mundo, traduzidos para as línguas de todos os povos. Não seria mais prático se estes jornais seguissem o exemplo dos jornais esperantistas e publicassem os

seus números só em Esperanto para todo o mundo? Isto evitaria uma soma imensa de trabalho e capital desperdiçados inutilmente com a existência dos tradutores para todas as línguas.

Ora, sendo o Esperanto uma língua viva, sendo uma grandiosa realidade, não é óbvio que ignorá-lo representa um lamentável estado de atraso cultural? Não é certo que não poderá haver cultura completa sem o conhecimento do Esperanto? Já tendo sido publicados em Esperanto milhares de livros traduzidos das literaturas de todos os povos e outros milhares escritos originalmente no idioma humano, não apresentam uma insuficiência cultural os que o desconhecem? Sendo a nossa época intensamente e cada vez mais internacionalista, o chauvinismo vai naturalmente se acabando por não ter mais razão de ser, só existindo ainda nos indivíduos mais atrasados em relação ao nosso século. E não é verdade que os que sabem apenas o seu idioma nacional e mais uma ou mais línguas de outras nações, não estão com a sua cultura incompleta, por estarem fora do espírito internacionalista da nossa época? Não é certo que os ideais esperantistas de uma só família e uma só língua sobre a terra, não são também os ideais de todos os que estão em dia com os progressos do nosso tempo? Lógico é claro também que não há cultura completa sem cultura esperantista, isto é, sem o conhecimento do Esperanto e sem o conhecimento da "interneta ideo" do esperantismo.

Ora, está demonstrado, pela experiência de mais de meio século, que o Esperanto é uma língua viva, muitíssimo mais fácil, flexível, lógica, simples, sonora e bela que todas as línguas naturais, cuja imensidão de dificuldades, irregularidades e erros é estudada nas suas respectivas gramáticas. Mas, além da experiência que prova, resta-nos ainda um raciocínio que demonstra a exatidão da nossa tese, isto é, de que não há cultura completa sem cultura esperantista. Ei-lo: o todo é composto por partes; se falta uma destas partes, o todo já não será todo, será incompleto; para ser um todo deverá existir a conjunção de todos os seus componentes. Ora, a cultura é um todo, é um total de conhecimentos artísticos literários, científicos, práticos e profissionais; e o Esperanto é uma das partes mais importantes deste conjunto harmonioso; logo, se falta o Esperanto na cultura, esta já não será completa, pois falta uma das suas partes mais imprescindíveis à nossa época: não haverá cultura completa sem o conhecimento do Esperanto.

E assim fica provado o judicioso pensamento do nosso patrício Afonso Celso, quando disse: "Dentro de pouco tempo quem não conhecer o Esperanto não poderá ser considerado homem culto".

Diderot Freitas

Nur du lingvojn lernu tuj,  
Kaj ne pensu pri la tria:  
Estu unu de l' Patruj',  
De l' homar' estu l' alia!

I. G. B.



## Prof. J. B. Mello e Souza

VIZITO — Sabate la 19an ni estis agrable surprizitaj de la vizito de la sekretario de Brazila Esperanto-Ligo, profesoro J. B. Mello e Souza. Veturinte al Montevideu por fari kelkajn prelegojn, la lastan tagon de lia ĉeesto ĉe la rivero La Plata li faris viziton al Buenos Aires. Komprenoble — kaj bedaŭrinde — tiu vizito estis tre mallonga kaj dum tro frua horo (19a) kiam nur tre malmultaj samideanoj ĉeestas la ejon. Tamen la gekursanoj de s-ro Sekelj havis okazon aŭdi la tre interesajn diraĵojn de klera, fervora kaj simpatia esperantisto.

(El "Argentina Esperantisto", oficiala organo de "Argentina Esperanto-Ligo").

## COMO FALARAM OS PROFETAS

Oferecido pelo Dr. Roberto das Neves, jornalista e esperantista português, que reside atualmente nesta capital, recebemos um exemplar da tradução por ele feita do livro "Como falam os profetas", da autoria de Ernst Izgur, pseudônimo literário de Karl Shneider. O livro traz um prefácio do escritor americano Harold W. Kennedy, do qual transcrevemos o seguinte: "Todos os seus livros foram compostos e editados originalmente na língua Esperanto, o idioma auxiliar internacional, de que o autor foi, desde muito jovem, um extrênuo cultor e propagandista. São belíssimas as suas traduções em Esperanto, de várias obras clássicas, traduções editadas em Berlim, Paris e Budapest".

Reproduzimos a seguir um dos últimos capítulos desse livro intitulado: "Os Estados Unidos da Europa e a Derrocada da Torre de Babel". — "Mas tudo se transformou, com o decorrer das idades, graças à conquista da técnica, ao avanço das ciências, ao acúmulo da experiência humana.

"Após guerras sangrentas, que devastaram todas as nações da Europa, estas compreenderam, por volta de 1950, que os interesses da civilização, da paz e da técnica lhes impuzeram o exemplo dos Estados Unidos da América, e então aboliram as fronteiras políticas e alfandegárias que as separavam, impedindo-os de viver pacificamente, e constituíram aquilo pelo que muitos políticos e escritores clarividentes dos séculos 19 e 20, como Vitor Hugo, Masaryk e Churchill, clamaram: os Estados Unidos da Europa.

"O problema linguístico foi resolvido com a adopção do Esperanto, que o grande e genial filólogo dr. Luiz Lázaro Zamenhof havia inventado nos fins do século 19 e que cedo ganhara alguns milhões de adeptos em todo o mundo, entre os quais notáveis cientistas, pela sua facilidade, simplicidade, clareza e eufonia. Esse belo idioma, que hoje, passados quatro séculos, é o único em todo o mundo, servia já, em 1935, de língua auxiliar entre os povos dos demais idiomas, e a sua expansão nessa época era já tão grande que governos como os do Brasil, Itália, Holanda e outros haviam-lhe dispensado

## BRAZILAJ NATURBELAĴOJ



Grandioza aspekto de la "Garganta do Diabo" (Diabla Gorĝo), tra kie paŝas la limo inter Parana kaj Argentino. Kaskadaro de Iguassú aŭ Sankta Mario. Rivero Iguassú. Pro siaj naturaj belaĵoj ĝi estas centro de turisma allogo.

(Kliŝo de la "Brazila Konsilantaro de Geografio")

o calor da sua proteção. Já nesse tempo, a própria Sociedade das Nações publicava um boletim em Esperanto, e nesta língua haviam aparecido mais de 6.000 obras, originais e traduções. Se aqui me refiro a esse fato é porque não ignoro a grande influência que exerceu o Esperanto na evolução espiritual do mundo, como veículo internacional da cultura e como elemento aglutinador e pacificador dos povos.

"Com o Esperanto, que representa na nossa época papel idêntico ao representado, na Idade Média, pelo latim, que foi, então, igualmente, um idioma auxiliar internacional — tornou-se uma ridícula e anacrônica metáfora, acabando por desmoronar-se, a Torre de Babel, que, durante muitos séculos, impedira os povos de se entenderem e de se amarem".

## PROTESTO

De escritor brilhante e dos mais lidos, notadamente nos nossos meios didáticos, começou a circular há pouco um livro no qual há uma personagem ridícula e grotesca denominada "Dr. Zamenhoff".

E se não digo aqui qual o escritor é porque não lhe voto nenhuma ogerisa, mas, ao contrário, intensa admiração, ainda que profundamente dele divirja quanto a modos de ver e de pensar.

Já a Liga Esperantista Brasileira, pela pena, sempre atraente, do seu ilustre secretário geral, J. B. de Melo e Sousa, dirigiu veemente e eloquente protesto à firma editora do livro, contra o aludido "gesto desrespeitoso para com a memória do autor do Esperanto".

Fazendo justiça à recomendável atividade da firma editora, J. B. de Melo e Sousa enfileira, com grande felicidade,

argumentos irretorquíveis, para pleitear que sejam sanados, como é mister, nas posteriores edições, o erro e a injustiça do trabalho contra o renome do genial criador da língua-segunda universal, cujo nome, ainda que grafado com dois ff, quando ele o escrevia com um, para logo mostra que não é feita senão a ele próprio a alusão pejorativa em aprêço.

Recorda muito bem o protesto que a criação do idioma internacional é uma das grandes conquistas humanas em prol da concórdia dos povos, e ainda que a mesma obra meritória tem sido, pelo Governo Nacional, prestigiada de modo inequívoco, por atos dos quais destaca o que tornou o Esperanto língua auxiliar do Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, dirigido pelo dinamismo construtor do Embaixador Macedo Soares.

E o objetivo primordial destas linhas é exatamente o de pôr em realce um dos atos oficiais, focalizados em globo pelo protesto, e com os quais teem os Poderes Públicos do país rendido à memória de Zamenhof o preito a que ele fez jús.

Não é de hoje que há aqui, na capital da República, e em bairro populoso, o nome do sábio polonês nas placas duma rua.

E' exato que nem sempre o nome de logradouros públicos representa uma homenagem justa.

Mas Zamenhof não está em casos tais.

Ao ler o seu nome, numa via pública, ninguém necessita indagar quem ele foi.

E ninguém poderá dizer que tal preito foi devido a empenhos, nem que obedeceu a interesses subalternos.

Vale por uma homenagem espontânea e justa, da maior cidade do Brasil. — D. B. (Domingos Barbosa).

(Do "Jornal do Brasil").



# BRAZILA KRONIKO

**CEARÁ.** — *Fortaleza.* Fariĝis membro subtenanta (MS) de IEL nia malnova samideano d-ro Demócrito Rocha, direktoro de la gazeto "O Povo".

*Limociro.* La loka grupo, kies prezidanto estas d-ro Deoclecio Lima Verde, pagis al niaj Ligoj, la nunjarajn kotizojn de sep anoj.

**RIO-GRANDE-DO-NORTE** — *Natal.* La "Esperanta Asocio de Rio-Grande-do-Norte" pagis al BLE la jarkotizojn de kvin anoj, inter kiuj la novaj asocioj: S-roj Aurino Suassuna, Apeles Lemos kaj Valfredo Pereira.

**PERNAMBUCO.** — *Recife.* Ok geanoj de "Pernambuka Esperanto-Asocio" realiĝis al niaj Ligoj. Ĉiuj estas aktivaj membroj kaj delegitoj de IEL.

Ni ricevis la Aŭgustan numeron de "Pernambuco Esperantista", sur verdkolora papero, per kiu ĝi memorigas sian trijaran vivon. Sur la unua paĝo estas artikolo, en portugala lingvo, titolita "Prezentado", kaj kliŝo de "Veridianinho", gracia fileto de la esperantistaj gesinjoroj Viridiano P. Araujo kaj Carmesina Monteiro de Araujo. Li tenas entuziasme verdan standardeton. Ni deziras, ke li fariĝu fervora esperantisto. Tiu numero enhavas ankaŭ artikolojn de d-ro Agui-naldo Lins, prezidanto de PEA; de Pastro Bernardino de Carvalho, el Altinho, nova, sed fervorega esperantisto; de nia kormemora samideano Odilon de Araujo, de s-roj Moacir S. Cunha kaj Jaceguai Campos kaj de f-inoj Iracema Ferreira Pires kaj Leonora Sterling Armstrong.

*Altinho.* Dank' al la klopodoj de Pastro Bernardino Carvalho fondiĝis la "Esperantista Grupo Odilon Araujo". La solena inaŭgura kunsido okazis la 21an de Februaro lasta. Jen ĝia unua estraro: Prez. — Pastro Bernardino Carvalho, vicprez. — s-ino Amália Rocha, unua sek. — f-ino M. Dolores Carvalho, dua sek. — s-ro Coaraci de Barros Correia, unua oratoro — s-ino Maurina Rodrigues, dua oratoro — s-ro Felisberto Pessoa, unua kasistino — s-ino Natalice Ar-ruda, dua kasistino — f-ino Júlia Jacobina, ricevanto — s-ro José Murilo kaj biblio. — f-ino Rute de Barros Correia.

S-ro Veridiano de Carvalho kaj lia edzino, loĝantaj en Caruarú, vizitis la sidejon de l' grupo kaj gratulis Pastron Bernardino Carvalho pro lia entuziasmaj laboroj por Esperanto, al

kies propagando li intencas sin dediĉi, kiel apostolo.

**BAÍA.** — *Salvador.* Aliĝis al niaj Ligoj s-roj Efraim de Carvalho Borges kaj ing. Cesar Telles Ferreira kaj realiĝis kvar malnovaj, anoj de "Esperanta Grupo de Baía". Nia fervora samideano d-ro Jaddo Couto Maciel donacis al kelkaj pastroj kaj religiaj asocioj ekzemplerojn de la broŝuro "Esperanto kaj Katolikismo". La gazeto "Semana Católica" aperigis noton pri tiu broŝuro.

La "União da Juventude Espírita de Baía" malfermis semajnan kurson de Esperanto, kiun direktas s-ro Antonio Melquiades Cardoso e Silva.

**SÃO PAULO.** — *São Paulo.* Kvin geanoj de la loka klubo, ĉiuj aktivaj membroj de IEL, pagis siajn nunjarajn kotizojn.

*Santos.* Ĉe la sidejo de la "Grupo esperantista F. V. Lorenz" malfermiĝis nova kurso de Esperanto. Notoj pri la helplingvo aperis en la gazeto "A Tribuna".

**SANTA CATARINA.** — *Florianópolis.* La 9an de Januaro lasta, kun la ĉeesto de 16 samideanoj, okazis kunveno, dum kiu fondiĝis la "Esperantista Klubo de Florianópolis". Jen ĝia unua estraro: Prez. — s-ro Antonio de Pádua Pereira, direktoro de la Komunuma Servo de Statistiko; sek. — s-ro Giovanni P. Faraco, loka delegito de IEL; kas. — s-ro João Teixeira da Rosa Junior, ŝtata oficisto; kunordiganto — s-ro Ivo N. Maes, ĉefasistanto de la Ŝtata Departemento pri Statistiko. La ceteraj anoj estas federaciaj, ŝtataj kaj komunumaj oficistoj kaj unu estas gimnazia instruisto. Inter ili estas la Direktoro de Ŝtata Departemento de Gazetaro kaj Propagando.

S-roj Pádua Pereira kaj Ivo N. Maes brile partoprenis la kurson de Esperanto okazinta en la jaro 1941 ĉe la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko".

La 16an de la sama monato okazis kunveno de la estraro de l' Klubo, kiu aprobis laŭdon al la estraro de "Brazila Ligo Esperantista" pro ties vigla laboro por la venko de Esperanto. La Klubo decidis aliĝi al niaj Ligoj kaj malfermi kurson de Esperanto. Ĝi sendis dulingvan cirkuleron pri sia fondo al ĉiuj Esperantistaj grupoj.

**MINAS GERAIS.** — *Ubá.* La duan de Marto okazis la naskiĝa datreveno de s-ro José Gomes Braga, nia loka delegito, kaj tial liaj lernantinoj, pere de la tiea radistacio, dediĉis al li kel-

kajn muzikaĵojn kaj lin vizitis nokte. Ĉe fino Edina Barros oni preparas ĥoron por la kantado de la esperantista himno, kiu baldaŭ estos kantata antaŭ la mikrofono de tiu radistacio. Al s-ro José G. Braga niajn korajn gratulojn.

**RIO-DE-JANEIRO.** — La 13an de Januaro okazis ĝenerala kunsido de "Brazila Ligo Esperantista", pri kiu ni parolas aliloke.

La "Associação Esperantista do Meyer", en kies sidejo malfermiĝis nova kurso, kiun ĉeestas pli ol dudek gelernantoj, daŭrigas sian viglan propagandon kaj pligrandigas sian membrkvanton. Fariĝis Mj la simplaj membroj s-roj Aldino de Freitas kaj Arnaldo Gonçalves Pires. Aliĝis al niaj Ligoj kiel MJ s-ro Adhmar Fernandes dos Santos kaj kiel simplaj membroj (AM) s-roj Adolpho Passaro, Aylton de Lima Rocha, Cecilio Alves de Oliveira, Estevam Fernandes Moreira, Frederico Rossner, Irineu Americo, João Vieira Lima, Manuel Joaquim Pereira, Manuel Loureiro Pacheco, Milton Santos Periquito, Sebastião Laffitte kaj Sebastião Pereira de Magalhães. Tiu ĉi amasa aliĝo estas konsekvenco de la decido de tiu Asocio sekvi la agmanieron de la veterana "Brazila Klubo Esperanto", kies ĉiu membro estas, de sia aliĝo, membro de BLE. Ke la aliaj brazilaj esperantistaj grupoj sekvu tiujn belajn ekzemplojn, estas nia forta deziro!

Aliĝis ankaŭ kiel MJ, pere de "Brazila Klubo Esperanto", s-ro. Mozart Barbosa Copio kaj, senpere, s-ro Ricardo Lopes Gouveia. Reveninte el Japanujo, kie li okupis la oficon de ambasada sekretario, realiĝis al B. L. E. la malnova esperantisto d-ro Ruy Pinheiro Guimarães.

La "Societo Esperantista Frateco" jam havas sep anojn. Funkcias kurso en sia sidejo sub la direkto de ĝia prezidanto, s-ro Diderot Freitas.

Komenciĝis nova kurso, direktata de s-ro José Braga Netto, ĉe la sidejo de la "Grupo Esperantista Bezerra de Menezes".

Artikoloj pri Esperanto, verkitaj de Prof. Domingos Barbosa, aperis sur la kolonoj de la multlegata "Jornal do Brasil". "Reformador", oficiala organo de la "Brazila Spiritisma Federacio", aperigis diversajn artikolojn kaj notojn pri Esperanto. Ni citas la jenajn: "Esperanto kaj Katolikismo", "S-ino Roosevelt kaj la internacia lingvo" kaj "O Esperanto kaj la eston-



teco de la Homaro". En la nova Katalogo de la Librejo de tiu Federacio jam estas anoncata la "Kompleta Vortaro Esperanta-Portugala" aranĝita de s-roj A. Couto Fernandes kaj Carlos Domingues, kiu estas presata ĉe la presejo de tiu Librejo.

La grava vesperjurnalo "A Noite" publikigis artikolon pri internacia lingvo titolitan "Pidgin estas la solvo". Parolinte pri diversaj projektoj de artefaritaj lingvoj li diras, "ke Esperanto estas hodiaŭ oficiale rekonita internacia helplingvo". Poste li parolas pri la "Universala Pidgin", angla dialekto enhavanta malmulte da vortoj kaj uzata ĉe la havenoj de la Ekstrema Oriento kaj Levanto. S-ro Littlewood, kiu ĝin ordigis, pretendas, ke ĝi fariĝu internacia. La artikolo finiĝas per citaĵo de ironia komentario de Bernard Shaw.

"Mirim", infana publikigaĵo, kiu apartenas al la entrepreno "A Noite", aperigis artikolon titolitan "La homaro estas nur unu, sed parolas mil malsamajn lingvojn. Ĝi finiĝis jene: "La plej famaj el tiuj saĝuloj nomiĝas Zamenhoff kaj kreis sciencan lingvon nomatan Esperanto, tre facila por esti lernata de ĉiuj rasuloj. Bedaŭrinde, la demono de la fiereco ne ĉesigas la disigon de la popolo: pro falsa patriotismo tiu lingvo ne estas lernata en ĉiuj mondaj lernejoj kaj ĝis hodiaŭ Esperanto estis nur bela espero..." Malgraŭ tio, ni esperas, ke tiu espero fariĝos realaĵo.

La "Revista de Educação contra Incêndios" transskribis la artikolon de Prof. Domingos Barbosa pri la broŝuro "Urbo Salvador" aperintan sur la "Jornal do Brasil" kaj ĝin ilustris per kliŝo aperinta en "Brazila Esperantisto".

#### INTERNACIA ESPERANTO-LIGO 1943

Pagaram suas quotas como MS (Membro cooperador) os seguintes sócios: Srs. dr. Demócrito Rocha, do Ceará; A. Caetano Coutinho, A. Couto Fernandes, Ismael Gomes Braga, Antonio José Vaz e Manoel Jorge Gaio, desta Capital.

Pagaram suas quotas como MA (Membro assinante) os seguintes: Srs. dr. Deoclécio Lima Verde, do Ceará; Tomaz T. Vila Nova e Augusto M. Porto, de Pernambuco; dr. Jaddo Couto Maciel, da Baía; Senhorita Edith Wehrs e Herminia Magalhães, do Estado do Rio; Srs. dr. Geraldo de Azevedo, O. Kühne e Constantino de Carvalho, do Estado de S. Paulo; José Gomes Braga, de Minas Gerais; Ary Zamora, do Rio-Grande-do-Sul, dr. Carlos Domingues e Arminio de Moraes, desta Capital.

Pagaram suas quotas como MJ (Membro com direito ao Anuário) os seguintes: Srs. Sebastião Augusto, do Amazonas; dr. Francisco Montelo, do Maranhão; Eugenio de M. Pais Barreto, Jaaziel de

## Perpétuas e Sempre-vivas

Perpétua e sempre-viva são denominações de plantas comuns entre nós, de flores imarcescíveis; mesmo depois de secas, conservam-se por dilatado tempo, sem mudar de cor nem de forma.

Por essa razão, na França e em alguns outros países europeus dão o nome de *immortelle* a tais plantas.

Os dicionários e vocabulários esperantistas empregam, para designá-las, os termos — *helikrizo*, *gomfreno*, *imortelo*, *sempervivo*.

Assim: *Perpétua* é *helikrizo*, nos dicionários: esperanto-português de Jozefo Joels; português-esperanto de Couto Fernandes, Carlos Domingues e Porto Carreiro Neto; suplemento esperanto-português de J. A. Proença.

É *gomfreno*, nos dicionários esperanto-português e português-esperanto de Tobias R. Leite.

*Sempre-Viva* é *helikrizo*, nos dicionários Tobias Leite, e *sempervivo* no dicionário C. Fernandes, Domingues e Porto Carreiro.

Inserem *helikrizo*, para traduzir *immortelle*, vários dicionários esperantistas: O da Presa Esperantista Societo, de 1910 (*immortelle jaune*); Esperantisto Hand — Worterbuch de Benemann; Dictionnaire Complet de Grosjean — Maupin; Plena Vortaro esperanto-franca, de Boirac (1909) — Vocabulaire technique français-esperanto e Enciklopedio Vortareto Esperanta, de Ch-Verax. O Plena Vortaro de Esperanto dá *helikrizo* para o gênero botânico *helichrysum*.

Apenas um dicionário, dos que possuo, o inglês-esperanto, de Fulcher-and-Long, traz o neologismo *imortelo*, para traduzir *immortelle* ou *everlasting flower*.

*Sempervivo* é o termo empregado para designar planta da família das Crassulaceas, *Sempervivum tectorum*, *Sedum tectorum*: *hauslach*, *hauswurzel*, em alemão; *houseleek*, em inglês; *joubarbe*, *artichaut des toits*, em francês; *yerba puntera*, em espanhol; *arroz dos telhados*, *alcachofra* ou *cacho dos telhados*, em português (dicionários citados e mais Poliglota Vademecum de Ch. Rousseau e Esperanta Teknika Medicina Vortaro, do Dr. Briquet).

Há também uma planta do gênero *Sedum*, em francês *petite jourbarbe*, e que em português chamam *saião pequeno* ou *sempre-viva*.

A tradução de *immortelle* nos dicionários francês-português, inglês-português

Souza Campos, dr. Aginaldo Lins e Moacir S. Cunha, senhoritas Artemisa Vidal de Araujo e Iracema Ferreira Pires, de Pernambuco; Paulino Santiago, de Alagoas; Srs. Hermes Pitta e Victor Miniéro, de Baía; dr. Mário Ritter Nunes e senhorita Balbina de Moraes, do Estado do Rio; Srs. Osvaldo Leite de Moraes, M. G. Rodrigues Monteiro e Newton Ceratti, D. Judith Loureiro Rodrigues, de São Paulo; dr. A. J. de Faria Alvim, de Minas Gerais; Srs. general J. Silveira Sobrinho, dr. Henrique E. Couto Fernandes, dr. Viterbo de Carvalho, Delio Pereira de Souza, Adhmar Fernandes dos Santos, Mozart Barbosa Copio, Aldino de Freitas, Ricardo Lopes Gouveia, Arnaldo Gonçalves Pires, dr. H. Mota Mendes e D. Laurinda L. de Macedo Cardoso, desta Capital.

e alemão-português, que consultei, é *perpétua*.

Caminhoá (Botânica, 1877) diz que a *perpétua* ou *suspiro* (*Gomphrena globosa*) é a planta *immortelle*, na França, planta da China e do Japão, aclimatada no Brasil, a ponto de nascer espontaneamente em vários lugares.

E acrescenta em outro ponto que *Helichrysum* é o nome grego da *sempre-viva amarela* ou flor de Diana, imortal, sempre-bela (*Gnaphalium Stoechas* L.).

Como curiosidade, cito a tradução de *immortelle*, dada em "Lingvo Internacia" de 1906, no artigo "Terokultura Kalendaro": *senmortalajoj*.

Barbosa Rodrigues (Hortus Fluminensis) dá *Helichrysum* como *sempre-viva*.

A. J. de Sampaio, em seu trabalho "Nomes vulgares das plantas do Distrito Federal e do Estado do Rio" anota três plantas conhecidas por *perpétua*: *Xeranthemum* e *Acroclium roseum*, compostas, e *Gomphrena globosa*, amarantacea da Índia. Como *sempre-viva* dá o *Helichrysum bracteatum*, composta da Austrália.

A Farmacopéia Portuguesa, edição oficial, de 1936, dá como "*perpétua roxa* ou *saudade perpétua*" o *Xeranthemum annua* L.

A. Löfgren, no "Manual das Famílias Naturais Fanerogâmicas", cita como "*perpétuas*" — *Helichrysum orientale* e *Ammobium alatum*.

Para deslindar a confusão, tive a idéia de consultar a respeito um técnico, do Jardim Botânico, experimentado também em cousas de dicionários, Leonam de Azeredo Penna. Respondeu-me: "O nome vulgar "*sempre-viva*" é dado, no Brasil, a uma planta da família das Compostas: *Helichrysum orientale*. Também são chamadas "*sempre-vivas*" diversas Eriocaulaceas, comuns na Serra do Cipó (dessas que os floristas vendem, depois de colorí-las).

Na Europa o nome de "*sempre-viva*" é dado a plantas do gênero *Sedum*, e algumas vezes à nossa "*perpétua*", que é da família das Amarantaceas: *Gomphrena globosa*.

Em síntese, no Brasil o mais certo é: "*Sempre-viva*" — *Helichrysum orientale* (e outras do gênero *Helichrysum*). "*Perpétua*" — *Gomphrena globosa*.

É assim que deve constar nos dicionários brasileiros".

Ch. Verax, nas obras citadas, para as novas palavras concernentes à botânica aproximou-se o mais possível do nome latino, que é internacionalmente conhecido dos especialistas. Seguindo, aliás, a norma usada por Zamenhof, teve por escopo, como declarou, evitar as confusões que muitas vezes provêm dos nomes da linguagem popular corrente.

Apoiado, pois, em valiosas opiniões, parece-me poder-se convir em que:

1 — O termo *imortelo* é desnecessário e inútil, pelo menos para nós, que falamos a língua portuguesa.

2 — *Sempervivo* deve ficar reservado para planta do gênero *Sedum* ou *Sempervivum*.

3 — *Helikrizo* deve significar "*sempre-viva*" (*Helichrysum*).

4 — *Gomfreno*, como já usou Tobias R. Leite, indicará as nossas "*perpétuas*", roxas ou brancas — *Gomphrena globosa*.

Sirvam estas notas para que os competentes estudem e resolvam de vez o assunto.

CAETANO COUTINHO



**LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA**

PRAÇA DA REPÚBLICA, 54 — RIO-DE-JANEIRO

**QUOTA ANUAL**  
1943

Categoria

AM (membro simples) . . . . .	Cr\$ 15,00
MJ recebe o "Jarlibro" — Anuário) . . . . .	Cr\$ 25,00
MA (recebe o "Jarlibro" e a gazeta "Esperanto Internacia")	Cr\$ 50,00
MS (sócio cooperador, recebe o "Jarlibro" e a gazeta "Esperanto Internacia") . . . . .	Cr\$ 120,00

Todos recebem gratuitamente "O Brasil Esperantista".

Todo sócio da Liga é também sócio da "Liga Esperantista Internacional" com sede em Londres.

Os sócios de grupos filiados pagam menos Cr\$ 5,00.

**Grupoj Aligintaj al B. L. E.**

**BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"**. (1906). Sidejo: *Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro.*

**CENTRO ESPERANTISTA DE SANTOS**. (1932). Sidejo: *Rua Baía, 57. Santos, Est. São Paulo.*

**ESPERANTA GRUPO DE BAÍA**. (1936). Sidejo: *Rua Bangala, 18. Salvador. Baía.*

**S. PAÚLO ESPERANTA KLUBO**. (1937). Sidejo: *Rua Alabastro, 462. São Paulo.*

**PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCIO**. (1937). Sidejo: *Rua Gomes Coutinho, 318. Recife. Pernambuco.*

**GRUPO ESPERANTISTA "ISMAEL GOMES BRAGA"**. (1938). Sidejo: *Praça D. Moura, 334. Garanhuns, Pernambuco.*

**ESPERANTA ASOCIO DE RIO-GRANDE-DO-NORTE**. (1940). Sidejo: *Rua Vigário Bartolomeu, n.º 587. Natal. Rio-Grande-do-Norte.*

**GRUPO ESPERANTISTA DE LIMOEIRO**. (1940). Adreso: *Caixa postal, 73. Limoeiro. Ceará.*

**GRUPO ESPERANTISTA "HUMBERTO DE CAMPOS"**. (1940). Sidejo: *Rua Curitiba, 636. Belo Horizonte. Minas Gerais.*

**ESPERANTO-RONDETO DE S. SEBASTIÃO**. (1941). Sidejo: *Vila S. Sebastião. D. Pedrito. Rio-Grande-do-Sul.*

**GRUPO ESPERANTISTA "FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ"**. (1940). Caixa postal, 777. *Rua Henrique Porchat, 4. Santos. E. de São Paulo.*

**ASSOCIAÇÃO ESPERANTISTA DO MEYER**. (1942). *Rua Arquias Cordeiro, 295. Meyer. Rio-de-Janeiro.*

**BRAZILA LIGO ESPERANTISTA**  
(*Liga Esperantista Brasileira*)

**DIRETORIA**

**Presidente perpétuo** — Eng. Alberto Couto Fernandes.

**Vice-presidente** — Dr. Carlos Guimarães Domingues.

**Secretário geral** — Prof. João B. de Mello e Souza.

**1.º Secretário** — Dr. Mario Ritter Nunes.

**2.º Secretário** — Senhorita Iraní Baggi de Araujo.

**Tesoureiro** — Sr. Odillo Pinto.

**ESPERANTAJOJ**

Adquira na "Liga Esperantista Brasileira" o seguinte:

- Coleção de Chaves de Esperanto (10 línguas diferentes). Cr\$ 10
- "La Espero", hino esperantista, com música para piano. Cr\$ 3
- Ilustrita Lernolibro de Esperanto, de D. Delmau . . . Cr\$ 5
- Gramática, vocabulário e livro de exercícios . . . . . Cr\$ 6
- Cartão-postal contendo o resumo da Gramática do Esperanto, cento . . . . . Cr\$ 5
- Cadernos para o ensino prático de Esperanto . . . . . Cr\$ 3
- "La Vidvineto", romance de J. Alencar, traduzido pelo Dr. Luiz Porto Carreiro Neto . . . . . Cr\$ 5
- Dicionário Port.-Esperanto . . Cr\$ 25
- Distintivo esperantista (botão de seda com a estrela verde). Dúzia . . . . . Cr\$ 5

As encomendas, cujas importâncias forem inferiores a 20 cruzeiros, devem ser acrescidas de 10% para o transporte e registro.

**KORESPONDADO**

S-ro Diderot Freitas, **dudekvinjara**, medicina studento, deziras **korespondadi** kun **gesamideanoj** el la tuta **mondo**. Adreso: *Rua Barão de Ubá, 170, térreo. Rio-de-Janeiro. Brazilo.*

**O RADIO em 16 palestras**

(E. Aisberg)

Traduzido do Esperanto por

A. COUTO FERNANDES

E

CARLOS DOMINGUES

3.ª EDIÇÃO EM PORTUGUÊS

Preço 15\$000

Editores — **Irmãos Pongetti**

Encomendas à Liga Esperantista Brasileira

**LIVROS EM E SOBRE ESPERANTO**

PODEM SER ADQUIRIDOS NA

**LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA**

e nas seguintes livrarias:

Francisco Alves—Rua do Ouvidor, 166  
Livraria Rio Branco, à Rua S. José, 42.  
Livraria da Federação E. Brasileira —  
Avenida Passos, 30.

PEÇAM CATALOGO

**BONVOLU PAGI VIAN KOTIZON POR LA JARO**

1943.

**SPECIALA PREZO POR LA GRUPOJ**

FILIITAJ AL B. L. E.

10 Kolektoj (Gramática elemental de Esperanto, Vocabulário Esperanto-Português, Exercícios).

50\$000